

Ludwig Uhland,

## La kapelo

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Supre tronas sur la monto  
La kapelo en kviet'.  
En la valherbej' ĉe l' fonto  
Ĝoje kantas paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo  
Ektimigas mortkantad'.  
Finas tuj la ĝojjubilo  
De la knabo ĉe l' konstat'.

La ĝojintoj post la morto  
Supren en la tombojn venos  
Paŝtoknabo, laŭ la sorto,  
jen ja Morto vin eĉ prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.*

Ludwig Uhland,

## La kapelo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Supre staras la kapelo  
Sur la pinto de la mont',  
La paŝtist' en suna helo  
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto  
De funebro sonas de  
La altaĵ' tra la kvieto,  
La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni  
La gajuloj post viv-fin'.  
Ho, paŝtisto, iam oni  
Portos supren ankaŭ vin.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 – †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).*